

Esperanto en Perspektivo, Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo
de Ivo Lapenna, Ulrich Lins kaj Tazio Carlevaro, 2-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 600, 1975.04.09 & 12

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni prezentis al vi la libron *Esperanto en Perspektivo* dirante, ke temas pri vera enciklopedieto de Esperanto. Ni opinias, ke la aktivaj esperantistoj ne povos longe malhavi tiun ĉi libron en sia persona biblioteko.

A.- Ni deziras doni al vi ideeton pri la riĉeco de la enhavo de tiu 850-paĝa verko de Ivo Lapenna, Ulrich Lins kaj Tazio Carlevaro. Tiucele parton post parto ni prezentos al vi la temojn, kiujn ili pritraktas.

Cl.- La unua parto portas la titolon *Esperanto kiel solvo de la lingva demando en mondaj kadroj*.

A.- La unua ĉapitro, post konciza historia trarigardo kaj priskribo de la la latina kaj franca precedencoj kaj de la angla-franca kunregado en Ligo de Nacioj, raportas pri la nuna situacio kaj ties senĉesa komplikiĝo. Diversaj aspektoj de tiu lingva kaoso estas ekzamenitaj : temas pri la teknika-lingva, socia, psikologia, jura-politika kaj ekonomiaj aspektoj de la mondlingva problemo. Estas facile demonstri, ke el miloj da projektoj, nur la Internacia Lingvo Esperanto transformiĝis en vivantan lingvon de vivanta kolektivo.

Cl.- La dua ĉapitro ekzamenas, kiel esperanto fariĝis tiu novdimensia lingvo de internacia socio. Esperanto estas unu el la tri lingvoj troviĝantaj vertikale unu super la alia el vidpunkto de la tri ĉefaj aspektoj, en kiuj povas manifestiĝi la socia aparteno de la samaj personoj :al la regiono – la regiona dialekto, kiam ĝi ekzistas ; al la nacio – la naciaj lingvoj ; al la homaro – la internacia Esperanto.

A.- La tria ĉapitro raportas pri la esperanta kulturo kaj la kvara pri la instruado de Esperanto. Estas minejo da freŝdataj informoj kun statistikaj sciigoj. De nun la argumentado de la defendantoj de Esperanto povos baziĝi sur malpli onidiraj asertoj. La menciitaj faktoj povos estis diskonigitaj. Kaj ĉiuj aktivuloj povos informiĝi pri la antaŭe entreprenitaj agadoj, antaŭ ol sin ĵeti en la poresperantan batalon.

Cl.- Tiurilate la tria kaj kvara partoj alportos al ili multe da aliaj informoj. Sed unue ni raportu pri la enhavo de la dua parto, kiu portas la titolon *Literaturo*.

A.- Post prezento de la esencaj trajtoj de la esperanta literaturo, la sesa ĉapitro interesiĝas pri la originala beletro. Ĝi ankaŭ mencias la aliajn mondlingvajn provojn kaj reliefigas la decidigan influon de Ludoviko-Lazaro Zamenhof. Ĉiuj skoloj estas detale registritaj.

Cl.- La postaj ĉapitroj tre detale raportas pri la traduka beletro, pri esperanto en scienco, pri la fakaj terminaroj kaj pri la periodaĵoj. Ni troviĝas antaŭ minejo da sciigoj. De nun la kleraj esperantistoj ne plu povas sin permesi resti sen kontakto kun la literaturo, kies portanto estas ilia lingvo. Ili havas la eblecon informiĝi pri la respektiva valoro de la ĝis nun aperintaj verkoj. Fine trapasontoj de superaj ekzamenoj havos en la manoj gvidilon, kiu direktos ilin por la studado de la esperanta literaturo originala kaj tradukita. Ni ŝuldas tiun parton dediĉitan al nia literaturo al Tazio Carlevaro.

A.- La tria parto, kiu estas titolita *En Servo de kulturaj interŝanĝoj, praktikaj servoj kaj internacia solidareco*, raportas pri la institucioj kaj servoj, kiuj donis karakteron al la esperanto-movado. Belartaj konkursoj, oratoraj konkursoj, teatro, festivaloj, filmoj, kursoj kaj seminarioj, jen la kulturaj aplikoj. La delegitaj retoj, esperanto en la radio, en la komerco kaj industrio, en la turisma vivo, jen praktikaj aplikoj. Koncerne la kongresojn kaj konferencojn ni fine trovas sciigojn kun la teksto de la epokfaraj rezolucioj.

Cl.- La kvara parto estas dediĉita al la historio kaj al la nuntempa organizo de la esperanto-movado. Por la unua fojo la neneŭtrala movado estas tre objekte priskribita. La ĉefa aŭtoro de tiu parto estas Ulrich Lins. La ĉapitron pri UEA redaktis Ivo Lapenna. Tre utilaj sciigoj pri la funkciado de la Akademio de Esperanto, de CED, de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, de Internacia Somera Universitato kaj de diversaj fakaj institucioj konkludas tiun tre bone dokumentitan parton.

A.- La kvina parto, kies titolo estas *Atakoj kaj Apogoj* estas verko de Ulrich Lins kaj de Ivo Lapenna. Ĝi helpas nin pli bone konsciis, kie troviĝas la veraj malamikoj de Esperanto kaj ne entrepreni novajn kampanjojn sen atente informiĝi pri la diskutoj okazikintaj en Ligo de Nacioj kaj en Unesko koncerne la demandon de Internacia Lingvo.

Cl.- Mallonga konkluda parto titolita *Perspektivoj por la Estonteco* provas listigi la esencajn antaŭkondiĉojn, kies plenumado povus rapidigi la progreson de esperanto.

A.- Fine du tre bone faritaj indeksoj permesas retrovi la paĝojn, kiuj estas en rilato kun la materialo, por kiu ni havas intereson.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!